nia voĉo

madrida esperanto-liceo oktobro 2014

## REKOMENCIĜAS LA KURSO EN SIDEJO

Ekde la 20-a de septembro rekomenciĝis la kursoj de Esperanto en la sidejo de Madrida Esperanto-Liceo. Ili disvolviĝos ĉiujn sabatojn matene, inter la 11 kaj 13 horoj, sub la gvido de Juan del Castillo.

La klasoj organiziĝas en diversaj niveloj, de komencantoj ĝis progresantoj. Por aliĝi kaj koni pliajn detalojn, skribu al la adreso de MEL: madrid@esperanto.es.

## PRELEGO DE NICOLA RUGGIERO EN MADRIDO

Nicola Ruggiero, juna poeto el Italio nun loĝanta en Rejkjaviko, pasigos la unuajn tagojn de oktobro en Madrido, kaj ni profitos la okazon por aranĝi prelegojn kaj kunvenon.

La vendredon 3-an de oktobro, je la 7-a vespere, Nicola prelegos en la sidejo de Hispana Esperanto-Federacio pri la verko "La poemo de Utnoa", de Abel Montagut.

Sabate la 4-an, ni promenados en Madrido, sekvante la lokojn reliefigitajn en la verko "Bohemiaj lumoj" (*Luces de bohemia*) de Ramón Mª del Valle-Inclán, sub la gvido de Miguel Fernández. Temos iasence pri ripeto de la "Bohemia nokto", kiun ni ĝuis dum la Iberia Renkontiĝo de la jaro 2013. Ni rendevuos je la 7-a vespere en la plej emblema loko: trinkejo Casa Ciriaco, str. Mayor, 84.

Dimanĉe oni organizas ekskurson al urbo ekster Madrido. Ni konkretigos lokon kaj elirhoron dum la antaŭaj eventoj.

Ĉiu esperantisto estas invitata. Ni jam kalkulas je la ĉeesto de ekstermadridaj amikoj. Sabate kaj dimanĉe ankaŭ neesperantistaj akompanantoj estas bonvenaj.

## VIZITOS NIN

Vjetnama aktiva juna esperantistino Phuong Nguyen, pli konata kiel Flama Floro, kiu sekvos postdiploman kurson de la universitato UCAM en Murcio dum unu jaro, alvenos Madridon je la 2a posttagmeze la 9an de oktobro, kaj restos tie ĉi dum kelkaj tagoj antaŭ foriro al Murcio. Oni aranĝos renkontiĝon kun ŝi dum ŝia ĉeesto en la urbo.

Brazila amiko Rafael Henrique Zerbetto, kiu renkontiĝis kun iuj samideanoj en sia vojo al la Interlingvistikaj Studoj en Poznano, havos rean okazon mallonge viziti nian urbon matene la 1-an de oktobro. Li troviĝos en trajnstacio Atocha frumatene; se iu deziras aliĝi al la renkonto, kontaktu kun ni por informiĝi.

La 17an kaj 18an de oktobro nin vizitos esperantisto el Francio, Christian Castillon, kiu venas por partopreni kongreson pri la Williams-sindromo. La sabaton 18an matene ni iom turismos tra la urbo kun li.

## MADRIDANO EN POZNANO

En septembro komenciĝis nova eldono de la Interlingvistikaj Superaj Studoj en la Universitato Adam Mickiewicz de Poznano, la nuraj universitatnivelaj dediĉitaj al la artaj lingvoj. Granda parto de la programo estas dediĉita al la filologia studo de Esperanto.

Ĉijare la Studojn partoprenas tri studentoj venantaj el Hispanio, el kiuj unu el Madrido, nia samklubano Félix Jiménez.

## EN RADIO ECO LEGANÉS

Okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj, kiu estis celebrita la 26-an de septembro, HEF sendis komunikon por la gazetaro. Oni tie anoncis la lanĉon, fare de Eŭropa Esperanto-Unuiĝo (EEU) de la reta portalo http://lingvo.info.

Sekve al la informo, la prezidanton de HEF intervjuis loka (komunuma) radio de sudmadrida urbo Leganés, Radio ECO. La programo estas aŭskultebla en la retejo de la stacio http://ecoleganes.org/3682-leganenses-informativo-semanal.html kaj konkrete en: http://audio.urcm.net/archivo/mp3/20140925_leganenses_ECOLeganes.mp3 (min. 28,20)

La stacio kunlaboras kun aliaj lokaj radioj en aliaj urboj, do eble ĝi aperos ankaŭ aliloke.

## INTERNACIA SEMAJNO EN KATALUNIO

Inter la 4a kaj 11a de oktobro okazos en la konata turisma urbo Salou, en la sudo de Katalunio, la 22-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo, kiun ĉiuj jaroj organizas samideanoj de tiu landoparto. Ĝi tradicie arigas pli ol 150 esperantistojn de la tuta Eŭropo, en trankvila kaj rilaksa etoso, por ĝui samtempe la kulturan riĉecon de Esperantujo kaj la belecojn de la ĉirkaŭo. La sidejo elektita ĉijare estas la Hotelo *"Best Cap Salou"*.

En la programo de tiu ĉi eldono prelegos interalie prof. Rodica Todor, Gian Carlo Fighiera, Thierry Saladin, Marcel Delforce kaj Mª Rafaela Urueña. Oni aljuĝos la premion Ada Sikorska Fighiera al la geedzoj Josep Colom kaj Trini García. Estas planitaj tri ekskursoj for de Salou al la grotoj *Maravelles* apud Benifallet, al la urbo Amposta kun posta perŝipa vojaĝo tra la rivero Ebro ĝis la maro, kaj al la urbo Barcelono.

Pliaj informoj kaj aliĝoj ĉe la adreso: luis_serrano@ya.com.

Aliflanke, kiel ni jam anoncis, la ĉijara Iberia Renkontiĝo, organizata de la junularaj asocioj de la duoninsulo, disvolviĝis en L'Arboç (Katalunio), inter la 5a kaj 7a de septembro. Ĝin ĉeestis unu madridano, Alex Escobedo.

## STATUTO DE MEL

La nova Statuto de Madrida Esperanto-Liceo, kiu antaŭ kelkaj semajnoj estis oficiale aprobita de la registrejo pri asocioj de la Madrida Regiono estas nun publike alirebla en la retejo de MEL, en la adreso http://www.esperanto.es/pli/images/MEL/estatutos-2014.pdf.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30.

Ĉimonate la babilrondoj de la unuaj sabatoj okazos konekse kun la vizito de Nicola Ruggiero. Vidu antaŭan informon pri la loko kaj horo.

Por esti informitaj pri ĉiuj novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, la liston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/, kaj la Fejsbukan forumon https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/.